

Esperanto Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2015

Jarkolekto 2 - Numero 1



ENHAVOTABELO

de januaro 2015

Titola paĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni !.....	3
Moneroj & medaloj :	4
<i>Internacia Helpa Mono: La spesmilo- “moneroj”</i>	
<i>Loka Helpa Mono: 2 manĝofetonoj</i>	
Medalistoj: 2. Peter Götz Güttler (°1939).....	11
Historiaj aspektoj: Speso kiel grundo de eŭro (1).....	12
Terminaro: alfabeto listo (4)	13
El la gazetaro: “Unua anonco pri la “spesmilaj moneroj”.....	14
Retpoŝto	15

De ni por ... ni!

Jen la unua numero de la dua jarkolekto de “Esperanta Numismatiko”; la ĉefa temo de 2015 estos la spesmilo- “moneroj” kaj la sur ili bazita valutosistemo.

En ĉi enkonduko ni unuavice volas danki la membrojn kiuj reagis je niaj bondeziroj por la nova jaro aŭ sendis iun ajn vivsignon (bonvolu rigardi la rubrikon “Retpoŝto”!). Ankoraŭ pli multe da danko al tiuj personoj kiuj libervole sendis informojn aŭ pozitive reagis je kelkaj redakciaj helpopetoj.

Ni krome dankas la litovan medaliston s-ron Janis Strupulis, kiu sendis kune kun priskribo la kompletan aron de far li gravuritaj esperantaj medaloj. Evidente ni montros kaj priskribos tiujn belegajn medalojn en la sekvontaj numeroj de “Esperanta Numismatiko”.

Kromkrome nian dankon por Marc Vanden Bempt (Esperanto 3000, Loveno/Belgio), kiu sukcese traserĉis sian riĉan privatan Esperanto-bibliotekon kaj trovis gravan tekston en revuo, kiu konfirmas la kreon de ora medalo esperantista dediĉita al la 25-jara jubileo de Esperanto kaj donacita al Ludoviko en 1913.

Ankaŭ Zsofia Korody (ICH-Herzberg, Germanio) meritas nian dankon pro la kompilo kaj sendo de artikolo biografia pri la medalisto Peter Götz Güttler.

Fine ni kore dankas samideanon Utho Maier, kiu sendis al ni tre valorajn bildojn rilate s-ron Zauner, por ilustru la duan numeron de la dua jardeko.

Kompreneble ni fervore deziras, ke en 2015 la memborkvanto kaj la nombro de leteroj al la redakcia centro konsiderinde kreskos.


Ni ree petas ĉiun membron se eble varbi en 2015 almenaŭ unu novan membron.

Ni mem celas varbi novajn membrojn dum la jubilea Universala Kongreso en Lille (Francio), kie ni havos standon. Ni nepre sopiras persone konatiĝi kun plejeble multaj ENA-anoj!

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo C 1 – Internacia Helpa Mono

La spesmilo- “moneroj”



Lando: Svisio

Jaro: 1912

Pezo: 11 g/ 22 g

Metalo: arĝento (11/12 arĝento; 1/12 kupro)

Diametro(j): 30 mm/ 36 mm

Valoro(j): 1 Spesmilo/ 2 Spesmilo

Kvanto(j): ? / medalstampo

Diko: 2mm/ noĉrando

Rimarku la eksterordinaran patinon de la 1 spesmilo-monero!

Averso:

Montras la skribon JUBILEO DE ESPERANTO 1887-1912. Meze estas blazonŝildo kun stelo kaj flamoj el ujo super la blazonŝildo. Sub la ŝildo du laŭbranĉoj krucigitaj. La valorindikoj montras 1 S, respektive 2 S.

Laŭ artikolo en la nederlanda numismatika revuo "Muntkoerier" (n-ro 3 de marto 1994) la monerfiguro (busto de Zamenhof) estus inspirita de bronza plako kun bildo de Zamenhof.

Reverso:

Busto de Zamenhof kaj ĉirkaŭa skribo: D-ro L.L.ZAMENHOF AŬTORO DE ESPERANTO. Sub la ŝultro: Holy Frères.

Rimarko 1:

Eldonkvantoj: nekonataj; nuntempe ĝenerale konsiderataj kiel veraj raraĵoj, ĉefe la tipo 2 Spesmiloj.

Rimarko 2:

Okaze de la 25-jara ekzisto de la Unua Libro, en 1912 la svisa privata medalfarejo "Holy Frères" stampis arĝentajn "monerojn" de 1 Spesmilo kaj de 2 Spesmilo. Ili estis vendataj kiel memoraĵoj, verŝajne jam dum la Universala Kongreso de Krakovo (1912), kaj certe dum la UK de Berno (1913).

Ni certe scias ke Holy Frères stampis *minimume unu oran ekzempleron kun valoro 50 spesmilo!* Laŭ priskribo ĝi aspektis kiel la arĝentaj.



Rimarko 3:

La elpensinto de la spesmilo-monosistemo, profesoro René de Saussure, esperis, post venonta internacia akcepto de la spesmila sistemo, stampigi ankaŭ internacian **oran moneron de 10 spesmilo**. Tio ŝajne neniam realiĝis, sed ekzistas artikolo publikigita en "New York Times" de la 25a de aŭgusto 1913, kiu sciigis al la legantaro, ke Zamenhof ricevis **oran medalon de 50 spesmilo** dum la kongreso en Krakovo:

"Dr. Ludvig L.Zamenhof, elpensinto de Esperanto, ricevis oran medalon memore de la dudekvina naskiĝtago de la lingvo."

1,100 ESPERANTISTS MEET.

Twenty-three Nations Represented
at the Berne Congress.

BERNE, Aug. 24.—The Ninth International Esperanto Congress opened here to-day with 1,100 delegates present, representing twenty-three nations. Twelve American representatives of both sexes marched behind the American flag in the opening procession.

Dr. Ludwig L. Zamenhof, inventor of Esperanto, received a gold medal in commemoration of the twenty-fifth anniversary of the language.

Two Hurt In Central Park Runaway

H. Di Kelikien, a dealer in antiques at 709 Fifth Avenue, broke his right leg, and Theodore Raiz, an instructor in the Central Park Driving Academy, sprained his ankle yesterday afternoon when the horse behind which they were riding up the West Drive of Central Park took fright at an automobile, bolted, and overturned their dog cart on the West Lawn.

The New York Times

Published: August 25, 1913

Copyright © The New York Times

Galo SEBERT leviĝis, dankis al D^{ro} ZAMENHOF pro la invento de la lingvo kaj la faritaj servoj. Kiel dankesprimon, oni stampis specialan oran kvindekspesmilan medalon, okaze de la 25-jara jubileo. La medalon li transdonas al S^o SCHMID, kiu mem transdonas ĝin al gracia Svisino en naciaj vestoj; fine ŝi oferas la medalon al nia Majstro. Sur unu flanko, ĝi prezentas nian Majstron; sur la aliflanko estas gravurita simbola ŝildo surportanta stelon. Samtempe, alia Svisino malsupreniras la podion kun bela nacikolora kaj naciflora bukedo en la mano, kaj prezentas ĝin al la edzino de nia Majstro. Ambaŭ belajn noblajn gestojn salutas longa ovacio: ĉiu kongresano kore kuniĝis je ambaŭ fraŭlinoj por honori kaj ame danki la Majstran Paron.

La Revuo Bern 1913 p. 67 (La Naŭa Kongreso)

Rimarko 4:



Jen vere stranga ekzemplero de la 1Sm- medalo, trovita en Interreto en reta butiko, kies itala vendisto priskribis ĝin kiel “MEDAGLIA IN METALLO GRIGIO”. Laŭ petita traduko de nia membro Elda Doerfler, la vorto grigio signifas “griza- kiel aluminio”.

Mi tute ne povas klarigi la ekziston de la spesmila monero “griza”, do eble farita per aluminio, zinko aŭ alojo surbaze de kelkaj metaloj. Ĝi ŝajnas esti aĉaspekta kopio aŭ falsaĵo kun stranga grajneca surfaco. Ĉu provstampo por postaj falsaĵoj arĝentaj?

Tamen eblas ke ĝi estas tre valora kaj unika numismatikaĵo. En tiu epoko oni unue kreis modelon aŭ modelojn en gipso, t.n. gipsmuldaĵojn, poste oni stampis provmedalon en galvano por montri ĝin al la komisiinto. Galvanaĵo estas kliŝo, reprodukitaj reliefoj per galvanoplastiko. Laŭ PIV galvanizi estas “Surkovri ion per maldika tavolo da metalo helpe de elektroliza kontinua kurento: *oni ordinare galvanizas metalajn surfacojn per zinka tavolo, tiel ŝirmante ilin kontraŭ rustiĝo.*” Ĉu ĉi-tiu aĉaĵo eble estis provstampaĵo de 1 Sm?!

Karaj legantoj mi petas vin sendi al ENA viajn proprajn sugestojn aŭ klarigojn, ĉar provizore ĝi restas enigma objekto!

Rimarko 5:

La 2 Sm estis nomata “spesmiloj”. Tamen pli korekte en Esperanto estus “spesdumilo” aŭ “duobla spesmilo”.

Rimarko 6:

En diversaj artikoloj la du tipoj de Sm estas konsiderataj kiel veraj raraĵoj. Hans Jankowski diras, ke al li neniu ekzemplero de 2 Sm estas konata, de 1 Sm nur du: unu kiun li mem vidis en la Muzeo en Vieno, la alian posedus pastoro Cseh.

Nu, kiam mi persone dum la lasta UK en Roterdamo demandis al la direktoro de la Esperanto Muzeo en Vieno pri ĝi, li respondis, ke en Vieno ne estas eĉ unu ekzemplero!

Mi mem en la lastaj dek jaroj malkovris en retaj butikoj kaj ĉe privataj personoj diversajn ekzemplerojn de 1Sm (kelkdekon), sed mi konas nur unu personon, en Aŭstrio, kiu posedas ambaŭ monerojn. Do ŝajnas ke la 2 Sm estas eĉ multe pli rara ol la 1 Sm-monero.

o o o o o o o o o o o o o o o o

Tipo C 2– Loka Helpa Mono

Loka Helpa Mono: 2 manĝojetonoj

Laŭ PIV: ĵetono = disketo el metalo, plasto ks, aŭ skulptaĵo sur glata fono

1.



Lando: ? (germanlingva)

Lingvoj: Esperanto kaj la germana

Diametro: 22 mm

Jaro: ?

Kvanto: minimume 190

Pezo: 1,06 g

Metal: aluminio / medalstampo

Diko: 1 mm

Averso:

La vorto ESPERANTO per samaltaj majuskloj (integritaj en la stampo). Sub ĝi la nombro 190 (ciferoj unuope aldonitaj post la stampado; la nulo troviĝas iome sub la nivelo de 19 kaj estas iome malpli granda.) Sub la ciferoj: sep reliefaj punktoj en vico probable kiel rektoŝnuro por la ciferoj. Perlorando.

Reverso:

1 MITTAGESSEN (=1 TAGMANĜO). Perlorando.

2.



Lando: ? (germanlingva)

Lingvoj: Esperanto kaj la germana

Metalo: aluminio / medalstampo

Diametro: 20 mm. Okangula kun flankoj je 8 mm

Kvanto: ?

Pezo: 0,94 g

Diko: 1 mm

Jaro: ?

Averso:

La vorto ESPERANTO (samstila kiel sur la unua manĝoĵetono!). Sub ĝi kvinpinta esperantostelo.


Reverso:

1 Mittagessen (nur la litero M majuskle)

**! ĈIUJN KROMAJN INFORMOJN PRI TIUJ ENIGMAJ PAGILOJ
BONVOLU SENDI AL ENA: bert.boon@skynet.be!**

MEDALISTOJ

2. Peter Götz Güttler (°1939)



La en Dresdono loĝanta artmedalisto Peter Götz Güttler estas unu el la plej famaj medalistoj en Germanio. Li naskiĝis en 1939 en Greifswald, finstudis en Dresdono kaj iĝis arkitekto. Jam je la komenco de la sepdekaj jaroj li preparis la fandon de medaloj. La provizora rezulto de lia artista laboro estas cirkaŭ 650 numismatikaĵoj kun multaj, diversaj motivoj kiel portretoj, homa agado, mitologiaj scenoj, arkitekturo, sporto, kaj ... Esperanto! Ankaŭ eventoj el la historio kaj prinovjaraj medaloj estas gravaj en lia verkado. Tre gravaj por li estas la kunvenoj de kolektantoj kaj la jubileoj de numismatikaj asocioj. Kiel numismato li okupiĝas intensive pri la diversaj paŝoj en la kreativa proceso, ekde la skizo ĝis la kompletigita fando. Li do produktas la medalojn "per propra mano". La preferata materialo por li estas la tielnomata "blankmetalo".

Ne mirinde ke li ricevis multajn premiojn, kiel la "Medalistan Premion" de Johann Veit Döll (2006). En 2009 la "Eligius-Premion" de Germana Numismatika Societo kaj la "Hilde-Bröer-Premion" en 2011. Liaj verkoj troviĝas en diversaj publikaj kaj privataj kolektoj en Germanio kaj eksterlande.

Sukcesplene li partoprenis en germanaj kaj eksterlandaj ekspozicioj. Okaze de lia 70a naskiĝdatreveno la "Monerkabineto de la Ŝtataj Artokolektoj" kaj la "Urba Arĥivo Dresdono" honoris lin por speciala fakekspozicio. La impona katalogo "Güttler-Medaillen - gegossene Sichten und Welten" respegulas la imponan diversion de lia pli ol kvardekjara medalkreado.

Ni jam montris kaj priskribis en la unua jarkolekto de "Esperanta Numismatiko" kvin el liaj medaloj, faritaj laŭ komisiono de ICH (Internacia Centro Herzberg). Ni certe ankaŭ prezentos al nia legantaro novajn esperantajn medalojn de Peter Götz Güttler. La artisto ja senpaŭze aktivadas.

Fontoj: Interreto + ICH (Zsofia Korody)

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Speso kiel grundo de eŭro (1)

A Prahistorio



En la jaro 1991 en Maastricht (Nederlando) la registaroj de la tiamaj dekdu membroŝtatoj de “Eŭropa Ekonomia Komuno” esprimis la komunan deziron fondi “Eŭropan Union”. Unu el la ĉefaj celoj de EU estis la enkonduko de komuna monunuo.

Tamen, tio tute ne estis nova projekto. Jam en la mezepoka periodo efektiviĝis monpaktoj, per kiuj ŝtatoj celis enkonduki unuforman monsystemon.


“Latina Monunio”, en 1865 kontraktita de Francio, Belgio kaj Italio, estis unu el la plej famaj paktoj. La kunlaborantaj landoj interkonsentis stampi orajn, arĝentajn kaj kuprajn monerojn, havantaj samajn pezon, titron kaj formaton. Tamen, ĉiu unuopa

lando rajtis uzi proprajn nomojn kaj monerfigurojn. Post kelka tempo Svislando kaj Grekio ankaŭ aliĝis al la “Latina Monunio”.

Aliflanke, Hispanio kaj Rumanio inter si uzis samspecan monsystemon. Kvankam “Latina Monunio” disiĝis pro la Unua Mondmilito, nur en 1925 ĝi estis formale malfondita.

En la supre menciitaj ekzemploj la paktoj estis oficialaj, efektivitaj inter kelkaj laŭleĝaj registaroj. La historio tamen mencias ankaŭ unu privatan projekton, per kio oni provis enkonduki internacian monsystemon, nome “Internacia Esperanto-Instituto”. En tiu projekto la Nederlanda Esperanto Centro en Hago vere ludis ŝlosilrolon.

Tiun gravan aspekton ni detale malkovros en la venonta numero, sed nun ni devas returni al la 19a jarcento.



Victor Hugo

La ideo pri komuna eŭropa monsystemo naskiĝis en la kapo kaj el la plumo de la mondfama franca verkisto Victor Hugo (1802-1885). Prave li estas konsiderata kiel la aŭtoro de la projekto por “Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo (“UŜE)” kaj por komuna eŭropa monsystemo. (i.a. en letero de 1855 al ekzilitoj, viktimoj de ŝtatrenverso de Napoleono la IIIa). Li propagandis por monunuo kontinentala kaj unika, kiu “... anstataŭigu kaj resorbu ĉiujn diversajn kaj absurdajn valutojn de hodiaŭ (...)”

daŭrigota

TERMINARO

Alfabeta listo(4):

fonkampo: liberaj spacoj kaj plataj surfacoj de monero aŭ medalo

grataĵo: mallarĝa, supraĵa sulketo per io pli-malpli pinta

kambio: komerca valorpapero

kolektanto: numismatoj estas foje diferencigitaj disde kolektantoj, ĉar tiuj lastaj baze ĝuas la simplan posedon de moneraĵoj, dum la atento de la aliaj centriĝas en la akiro de konoj pri tiuj. Fakte multaj numismatikistoj estas ankaŭ kolektantoj.

konservo: stato iam post la eldono

korodi: kemie difekti la surfacon de io

monerfiguro: portreto sur monero (aŭ medalo)

monunuo: la unuo de monsystemo (ekz. La eŭro, la spesmilo, la stelo ...)

plaketo: eta plako kun ecoj de medaloj

randumo: dikeco de la peco, normale geometrie prilaborita. Povas ankaŭ montri skribaĵojn

stilo: farmaniero de ĉiu figuro

surskribaĵo: skribaĵoj eblaj sur ĉiuj flankoj

titro: proporcio de la kvanto de multekosta metalo al la tuta pezo de la alojo

(daŭrigota)

Unua anonco pri la “spesmilaj moneroj”

• Esperantaj moneroj argĝentaj en valoro de 1 kaj 2 Sm., faritaj okaze de la Naŭa Kongreso en Bern de *Holy Frères*, gravuristoj kaj medalistoj en St. Jmier (Svislando). — Haveblaj ĉe Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1.

Jen la plej lasta novaĵo en Esperantujo, akceptita de la Bernaj kongresanoj kun granda ĝojo. La moneroj estas vere artece faritaj kaj similas entute al naciaj moneroj. Ili distingiĝas de tiuj ĉi ĉefe nur per tio, ke — ili ne havas realan valoron kiel pagiloj; sed tiom pli grandan idealan valoron ili havas por ni esperantistoj. — Ambaŭ moneroj montras la saman stampon, nur iliaj grandeco kaj cifero de l' valoro estas malsamaj. Sur la antaŭa flanko troviĝas bonege farita reliefa portreto de nia Majstro, ĉirkaŭata de la surskribo „Dro L. L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto“. La dorsa flanko montras blazonon kun kvinpinta stelo, maldekstre kaj dekstre de ĝi staras „1 (2) Sm“, supre kaj malsupre „Jubileo de Esperanto 1887—1912“. Kiu ankoraŭ ne posedas unu el tiuj ĉi metaligitaj unuoj de nia internacia monvaluto, nepre havigu ĝin al si kiel memorajon al la unua jubileo de Esperanto kaj al la komenco de nova epoko de nia movado.

Multaj germanaj gazetoj jam favore raportis pri la spesmilaj moneroj. Bedaŭrinde en tiuj ĉi sciigoj troviĝas grava eraro: oni diras, ke la esperantistoj klopodas pri la efektiva enkonduko de tiuj moneroj kiel internaciajn pagilojn en ĉiujn kulturŝtatojn. Tio estas kompreneble ne celata; tute sufiĉas, se nia spesmila sistemo iam servos nur kiel internacia kalkulvaluto.

Ika.

R E T P O Ŝ T O

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

28.10.2014 23:47

Kara Bert,

Nur nun mi prenas la bultenojn - mia poŝtkesto estas superŝutita pere de mesaĝoj, ankaŭ mi pere de farenadaĵoj... Sed mi ĝojos foliumi vian/nian bultenon! Dankon por ĝia sendo!!!

Amike, korsalutante vin kaj vian charman edzinon

fejfi

Magdaléna Feifičová

29.10.2014 10:42

Kara Fejfi,

Mi dankas vin pro via afabla mesaĝo. Mi ĝojas ke la bulteno plaĉas al vi! Mi esperas ke vi ankaŭ ricevis la trian numeron. Antaŭ la fino de oktobro vi ricevos la 4an numeron de EA.

Kun amikaj salutoj,

Bert

28.10.2014 23:51

Kara Bert,

Jes, ni ne renkontiĝos en Lille, tien mi ne veturos. Sed jes-ja, certe (se mia sano tion permesos al mi) mi venos en posta jaro al Nitra. Se ankaŭ vi venos, tie ni povos revidi nin denove!

Dankon por viaj afablaj vortoj rilate al mia persono!!!

Ing. Magdaléna FEIFIČOVÁ

ESPERANTO. ESPERANTO? ESPERANTO!

* *

www.esperanto.sk

www.edukado.net

www.lernu.net

* * * *

Tutcerte mi ne protestas pro via prokrasto de la respondo, vi vidas, ke ankau mi “dronas” kaj nur nun legas via(j)n mesaĝo(j)n...

Dankon, ke vi akceptas min en ENA. Mi volonte legos viajn bultenojn!!!

Amike jam duan fojon hodiaŭ

Fejfi

29.10.2014 10:49

Kara Magdalena,

Mi bedaŭras ke ni ne renkontiĝos en Lille (vi povas legi pri tio en la lasta 2014a numero.) Tre verŝajne mi ne povos ĉeesti en Nitra.Domaĝe!

Tamen ni daŭrigu la kontakton perrete.Ĉu konsentite?

Ĉion bonan, nepre koncerne vian sanon!

Amike kaj numismatike,

Bert



31.10.2014 17:24

Tre estimata S-ro Boon

Nur supraĵe kaj tre rapide mi “foliumis” rete la ENA-revuon, kiu estas eksterordinare riĉa je detalaj informoj, interesaj kaj valoraj donitaĵoj ks. Certe multon pli mi ĝuos ĝin legante trankvile.

Brave! Plej probable mi partoprenos en la Lille-UK, kaj tiam certe ĉeestos la Movadan Foiron. Kiel jam dirite, Filatelo kaj Numismatiko povos esti tute apudaj. En la kunveno certe ankaŭ filatelistoj venos.

Dankegon pro via laboro. Plej amike Elda

Triesta Esperanto-Asocio

www.tea1906.altervista.org

www.karstajtagoj.altervista.org

ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

www.elf-arek.wz.cz

31.10.2014 18:04

Estimata s-rino Doerfler, kara Elda!

Kun ĝojo mi ricevis kaj legis vian retmesaĝon. Mi deziras al vi agrablan legadon en trankvila etoso.

Mi jam antaŭĝojas pro via probabla ĉeesto en Lille, kie ni kune povus reklami pri esperantaj filatelaĵoj kaj numismatikaĵoj, kio laŭ mi estas pli ol nur simpla hobbio.

Dankon krome pro viaj pozitivaj kaj kuraĝigantaj vortoj. Mi daŭrigos instigi nian kreskantan membraron por iel ajn kunlabori...

Kun amikaj kaj samideanaj salutoj.

Sincere,

Bert

22.01.2015 20:56

Kara Elda,

Kiel vi fartas? Mi esperas ke bone!

Se mi ĝenas vin, mi pardonpetas. Tamen mi devas peti vian helpon, ĉar vi estas la nura persono en la rondo de miaj gekonatuloj kiu havas la italan kiel gepatran lingvon.

Aldone al grizaspekta medalo mi trovis la jenan priskribon: MEDAGLIA IN METALLA GRIGIO. Kion signifas GRIGIO? Ĉu estas sinonimo por ZINKO aŭ ALUMINIO?

Mi anticipe dankas kaj salutas vin

amike.

Bert (ENA)

23.01.2015 16:46

Kara Bert, dankon, mi fartas bone, la samon mi esperas ĉe vi.

Nenia ĝeno!

GRIGIO signifas: GRIZA - kiel ALUMINIO.

Tute nedankinde, kun koraj salutoj

via Elda

24.01.2015 17:33

Kara Elda,

Dankon pro via rapida respondo. Mi ĝojas pri la traduko. Tiel mi povas kompletigi la arikolon pri spesmilo, kiun vi kaj la aliaj membroj povos legi post ankoraŭ kelkaj tagoj.

Nenio nova en la filatela mondo, mi supozas. Esperas ke ĉi-jare vi trovos kelkajn (ĉu multajn?) kolektaĵojn el via mankolist(et)o!

Ĝis venonta reskribo.

Amike,

Bert



30.10.2014 23:26

Kara Bert,

Mi tre dankas la alsendon de via nova gazetnumero, kiu plaĉis al mi.

Je mia granda bedaŭro mi devas konstati, ke ĝis nun mi nur konservis viajn retleterojn, do ne forviŝis ilin.

Sed mi ne elŝutis la gazetonumerojn por presi papereldonon, kiun mi povas stoki en la biblioteka bretaro.

Nun mi volis fari tion, sed ho ve!

Mi tute ne povas trovi la numeron 3.

Supozante, ke vi ankoraŭ ĝin havas, mi tre kore petas sendi ĝin, almenaŭ kiel pdf!

Kore

Utho

31.10.2014 19:34

Kara Utho,

Dankon pro via mesaĝo. Evidente mi volonte havigos al vi denove la 3an numeron de la ENA-bulteno.

Samtempe mi ege dankas vin pro via intenco por presi papereldonon por la

biblioteka bretaro.

Mi havas ankaŭ petojn:

- Ĉu vi povus surbaze de miaj retleteroj varbi novajn membrojn por ENA?

-Ĉu mi povus aldoni vian propran nomon al la listo de la membraro?

Amike kaj samideane,

Bert

Aldono: jarkolekto 1 numero 3

10.11. 2014 9:55

Kara Bert,

>

> malfrue, sed tamen kore mi dankas vian helpon.

>

> Mi pensas, ke la Germana Esperanto-Biblioteko Aalen jam estas membro, ĉu?

> Kompreneble vi povas aldoni ankaŭ mian personan nomon, se vi pensas, ke

> tio

> havas sencon.

> Sed mi mem ne estas kolektanto; sed mi sukcesas ricevi ion, ĝi tuj iras

> al

> la stoko de la biblioteko.

>

> Aktuale mi ricevis de mortinta bopatro la medalon Vilho Setälä.

> Ĉu jam ekzistas priskribo de ĝi?

> Por mi ne estus facila tasko, fari la priskribon mem, ĉar ne kutimas tion

> kiel ne-kolektanto.

> Mi nur konas tiun ĉi: eo.wikipedia.org/wiki/Vilho_Setälä

>

> Aliakaze vi devus indiki, kiujn aldonajn informojn oni devus kolekti (ekz.

> mi povus fari foton ankaŭ de la dorsa flanko).

>

> Kun kora saluto

>

> Utho Maier el Aalen

11.11.2014 13:20

Kara samideano Utho,

- >
- > Dankon pro via letero de la 10a. Fakte, la GEB de Aalen estas jam membro
- > ekde la komenco.
- > Mi antaŭ nelonge pensis ke vi estas kunlaboranto aŭ oficisto de GEB.
- > Malkorekte do! Aŭ ne?
- >
- > Mi tutkore bonvenigas vin kiel nova kaj 29a individua membro de ENA..
- > Evidente via membreco havas sencon. Por ni, ĉar ni penas kreskigi la
- > membronombron kaj la interesularon en Esperantujo. Por vi, ĉar vi ŝajne
- > ne
- > estas sen intereso pri la numismatiko esperanta. Oni mem ne devas esti
- > kolektanto aŭ fakulo pri numismatiko por interesiĝi pri la historio, ĉu?
- >
- > Mi baldaŭ sendos al vi persone la kompletan 1an jarkolekton de nia
- > bulteno,
- > kaj fine de januaro vi ricevos la venontan numeron. En la kvara numero de
- > 2014 vi trovos la provizore kompletan priskribon de la Setälä- medalo!
- >
- > Se vi volus kunlabori en la estonteco, vi estos tute bonvena. En la
- > priskribo en la bultenoj vi trovos la elementojn kiuj estas menciindaj.
- >
- > Gratulon pro via membriĝo kaj ĝis reskribo.
- >
- > Amike,
- >
- > Bert

11.11.2014 1:55 PM

Kara Bert,

- >
- > dankon pro via respondo.
- > Mi estas la direktoro de la Germana Esperanto-Biblioteko.
- > Sed tio nur estas honorofico. Ni nur havas volontulojn, kiuj malŝparas la
- > liberan tempon por la bona afero.
- > Estas kiel en aliaj E-kolektoj, ke la kolekto ja havas sian gravan
- > valoron, sed la asociaj aŭ landaj membroj ne bon konscias pri tio.
- > Laŭ mia scio la nura escepto estas la Viena planlingva kolekto, kiu estas
- > propraĵo de la Aŭstra ŝtato; do ĝi havas propran buĝeton kaj profesiajn
- > bibliotekistojn, pagitajn ankaŭ de la ŝtato.
- >
- > Kore salutas
- >

- > Utho
- >
- > PS:
- > intertempe mi konas jenajn detalojn pri la medalo:
- >
- > Harri Laine priskribis ĝin tiel
- > (m.ipernity.com/#/doc/harri/4964314/in/group/59808):
- > Esperanto-Asocio de Finnlando eldonis en la jaro 1979 bronzan medalon pri
- > sia honora prezidanto, doktoro Vilho Setälä. La medalon formis skulptisto
- > Heikki Varja (1918–1986). La devizo “kaj lukti fidele por lumo” estas cito
- > el la poemo “Kio pli bela” de Eino Leino. La poemon esperantigis Setälä
- > kaj publikigis Malgranda Revuo en 1946. – La medalo estas solida bronzaĵo
- > kaj pezas 240 gramojn.
- > La eldonkvanto estis 500, eldondato: 12.12.1979, prezo: 120 FIM (t.e. al
- > ĉ. 20 €)
- > La fronto de la medalo montras la profilon de d-ro Vilho Setälä, kaj
- > priskribas la celojn de lia vivo kaj verko per la frazo "kaj lukti fidele
- > por lumo"; la dorsa flanko montras globon kun enskribo “internacia lingvo
- > Esperanto” en Esperanto kaj la Finna lingvo.

9.1 2015 18:24

Kara Utho,

Mi legis ke en la GEB troviĝas kelkaj raraj broŝuroj verkitaj de Josef Zauner. Ĉu ili eble ankaŭ montras foton de tiu esperantisto kaj amiko de Eŭropo?

Por la venonta numero de "Esperanta Numismatiko" (ENA) mi dezirus ilustru artikolon per portreto de tiu engaĝiĝinto por la afero de eŭropa monunuo. Anticipe mi jam dankas vin pro via serĉlaboro.

Se vi ankaŭ partoprenos en la UK Lille, mi volonte ofertas al vi "bongustan glason da..." por danki vin!

Kore kaj amike,

Bert

19 1.2015 10:59

Kara Bert,
 longe daŭris, ĉar mia profesio nuntempe tro okupas min.
 Bedaŭrinde: mi ne povis trovi iun bildon de Zauner.
 Mi tamen aldonas kelkajn aliajn bildojn el ties libroj, eble vi povus ion eluzi.
 Kore
 Utho

19 1 2015 20:20

Kara samideano Utho,

Ne vere gravas ke vi ne trovis portreton. La ilustraĵoj kiujn vi sendis estas ege interesaj, do sendube unu aŭ eĉ kelkajn mi uzos por illustri la numeron de la fino de aprilo.

Mi do dankas vin kore pro viaj penoj kaj rezultoj. Mi esperas ke la unua numero de 2015 plaĉos al vi!

Amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

31.10.2014 21:17

Kara Bert,

Dankon por via respondo. Pri via peto por novaj materialoj, mi bonvenigus la uzon de la bildoj de miaj ĉekoj, biletoj kaj kuponoj, kiujn mi menciis kiam ni unue diskutis ĉi tiun projekton. Mi ne scias multon pri ili (krom tio, kio aperis en la Enciklopedio de E en la 30-aj jaroj), do ni povus peti pliajn informojn de la legantaro - precipe tial, ke mi ne estas certa, ĉu kelkaj el la ĉekoj/biletoj estas postaj kolorkopioj anstataŭ originalaĵoj! La tri "temojn" ni povus uzi en tri malsamaj numeroj de ENA, por ne plenŝtopi unu solan numeron.

Sincere,

Martin

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

2.11.2014 21:53

Kara Bert,

Mi opinias ke via alvoko/projekto meritas pli grandan videblecon kaj ŝatus atentigi vin pri maklerejo.de kiu estas projekto de Frank Merla. Pliaj detaloj pri li estas legeblaj en vikipedio. Antaŭ kvin jaroj li inventis **perejon por unuopaj esperantistoj**, kiuj serĉas legantojn, helpon pri konkretaj aferoj kaj tiel plu. La plej multaj retejoj de esperantistoj ekzistas en la kredo ke iuj trovos kaj legos la retejojn. Mia impresio estas ke tiu sinteno havas malmultan efikon. Pli bone estas laŭ mi koncentriĝi je kvalifikoj kiuj komune efiku pli ol la sumo de ĝiaj eroj. Se vi deziras konigadon de via alvoko/projekto, skribu al info@maklerejo.de. Por akiri SENPAGAN anoncon en maklerejo vi ne bezonas malfermi konton, simple uzu retan formularon aŭ serĉi sur maklerejo lokon kie eblas indiki vian deziron. Ĉu vi deziras SENPAGAN anonceton pri via alvoko/projekto? Se jes, mi rekomendas difini vian anoncon tiel, ke unuopulo povu plenumi vian deziron. Legantoj de la maklerejo komprenu, ke temas pri instigoj al kunfarado.

Sincere via,

[google.com/+HermanDeceuninck](https://www.google.com/+HermanDeceuninck)

8.11.2014 17:05

Kara Herman,

Multan dankon pro via ege interesa mesaĝo pri la neceso de plia diskonigo de nia ENA-projekto. Mi tute konsentas, evidente!

Vi klare bone scias pri kio temas la projekto de Frank Merla. Tial mi afable petus vin mem uzi por ENA tiun rimarkindan eblecon.

Kial mi petas vin krome? Ĉar, kiel vi scias, mi preskaŭ tute sole preparas la bultenojn de ENA, flanke de miaj aliaj laboroj por niaj karaj lingvo kaj kulturo...

Se tio ne estus ebla aŭ alia kaŭzo malhelpus vin helpi min, ne estus katastrofo, ĉar iam mi probable trovos tempon por realigi ĝin.

Ĉiel, mi tre dankas vin kaj pacience atendas vian respondon.

Amike kaj samideane,

Bert

9.11.2014 21:02

Kara,

Frank petas ke la iniciatinto MEM faru la demandon. Tial mi devas sugesti fari tion vi mem.

Naturamike,
Herman

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

3.11.2014 10:28

Estimata Bert Boon,

Plej koran dankon pro la alsendo de la ENA-Revuo.

Tre volonte ni konservus, katalogus kaj bindus la revuon, por ke ni povu zorge gardi ĝin en la librokonservejo de la Kolekto por Planlingvoj ankaŭ por futuraj generacioj. Tial mi ŝatus demandi vin, ĉu vi eble povas sendi al ni ankaŭ printitan version de la ENA-revuo?

Dankeme kaj kore,
Bernhard Tuidier

3.11.2014 19:57

Estimata sinjoro Tuidier Bernhard,

Dankon pro viaj mesaĝo kaj peto!

Verŝajne vi ankoraŭ ne scias(bonvolu legi en Jarkolekto1 numero1), ke la membreco kaj la reta revuo estas tute senpagaj. Nia asocio ne havas estraron, do ankaŭ ekzistas nek kasisto, nek kaso, nek poŝtadreso! Do mi estas nur la iniciatinto de ENA, ne la estro aŭ prezidanto. Do, se mi sendus printitan version, mi devus pagi en la poŝtoŝeĉejo kiel privata persono, do el mia propra monujo. ENA do estas samideana rondo de numismatoj...

Tamen, ĉiu el nia membrolisto (sendi peton sufiĉas por esti membro!), do ankaŭ la Nacia Librejo Vieno, rajtas printi la revuon por la futuraj generacioj.

Krome mi ŝuldas al vi dankon pro via laŭdenda iniciativo.

Altestime kaj danke,

Bert Boon

5.11.2014 9:17

Estimata s-ro Bert Boon,

Koran dankon pro la informoj rilate la asocion!

Korajn salutojn,
Bernhard Tuidier

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

11.01.2015 6:13

Kvankam mi ne estas kolektanto de numismatikaĵojn, mi ĉiam legas „Esperanta Numismatiko-n“ kaj miras pri la nombro da esperantistaĵoj kiuj ekzistas en la numismatika mondo.

Gratulojn por via intensa serĉlaboro!

Ivo Schenkel

14. 01.2015 20:14

Kara Ivo,

Mirigi la esperantaron pri la amaso de nekonataj esperantistaĵoj en la numismatika mondo esperanta estas unu el la ĉefaj celoj de ENA. Kion vi jam vidis, estas nur kelkaj procentoj de la tuta trezoro! Daŭrigu miri!

Dankon pro viaj afablaj vortoj, kiuj estos instigo por daŭrigi la serĉlaboron.

Amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

11.01.2015 8:32 PM

Saluton Bert,

koran dankon pro la informo - kaj multan dankon pro via tuta laboro.

Mi ne tre atente sekvis la informojn por manko de tempo. Eble vi scias, ĉu iu volas eldoni ion (medalon, moneron ktp.) okaze de la 100a UK aŭ la 100-jariĝo de la morto de LLZ? Mi ŝatas fari ion, se ne volas labori paralele al aliaj kaj tute ne kontraŭ aliaj. Por la 100a UK jam nun estas tro malfrua, sed por 2017 oni povus prepari ion.

Eble vi jam havas la informon, se ne, mi verkus mallongan artikolon por ENA. Ĝis kiam vi bezonas artikolon por la venonta eldono?

Alfred

14 .01.2015 20:43

Saluton Alfred,

Dankon pro viaj afablaj mesaĝoj kaj propono pri skizo de monero aŭ medalo okaze de la 100-jariĝo de la morto de LLZ.

Bonvulu pli detale informi pri viaj eblecoj stampi numismatikaĵojn, la eventuala prezo ktp. Ĉi-demando estas tute privata.

Mi neniam akceptos prikomercajn anoncojn kaj ne rolos kiel peranto inter komercistoj kaj membroj.

Se vi volas verki mallongan artikolon por la revuo, vi povos sendi ĝin ĝis la 25a de januaro (jarkolekto2, n-ro 1) aŭ ĝis la 25a de aprilo(jarkolekto1, n-ro 2)

Samideane via,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆